



# Boletín

n° 416 Oktobro - Decembro 2016



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 416

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio

**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López

**Sekretario:** Águeda Biurrun

**Kasisto:** Rosa López

**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor

Raúl Martínez

Alejandro Escobedo (prezidanto  
de Hejs)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8397

# Salutvortoj

Karaj geamikoj,

Tiu ĉi numero alvenos al viaj hejmoj jam komence de la jaro 2017, kaj do, mi, nome de la tuta Estraro de la asocio, deziras profiti la ŝancon por deziri ke tiu ĉi nova periodo estu kontentiga kaj feliĉiga por vi, por viaj proksimumoj, kaj ankaŭ pri nia lingvo kaj nia komunumo.

La jaro koincidas kun grava datreveno de nia movado, la 100-jariĝo de la morto de la iniciatinto de nia lingvo, D-ro L. L. Zamenhof. Kiel vi legos en aparta artikolo, la Esperantomovado pretigas diversajn agadojn por kunmemori tiun datrevenon, kiu eĉ ricevis oficialan agnoskon de la UNESKO. Nia asocio deziras aliĝi al tiu kunmemorado, kaj komencis programi la unuajn agadojn, sed, kompreneble, ili ne povos realiĝi sen la kunlaboro de la esperantistoj, de la grupoj kaj la individuoj. Ni atendas vian kontakton, por studi la estontajn agadojn, per kiuj ni povos disvastiĝi la figuron de Zamenhof, lian verkon, liajn ideojn, kaj la lingvon de li proponitan.

La membroj de la asocio ricevis leteron en decembro, pri la lanĉo de kampanjo por aligi pli da homoj al HEF, por fortigi la Federacion. Ni estas sufiĉe kontentaj pri la rezulto de la iniciato, sed deziras ĝin intensigi, ĉar HEF estas nenio sen la partopreno kaj ĉefrolo de ĝiaj anoj. Tial ni ankaŭ deziras instigi vin partopreni en la ceteraj agadoj, kaj informi al ni kaj al ĉiuj HEF-anoj pri viaj iniciatoj. En la bulteno ni informas vin pri diversaj iniciatoj de la asocio, pasintaj kaj planataj, sed ili estas nur parto de ĉio kion ni kune povas entrepreni. Oni diras ke kunlaboro estas forto, kaj certe tio estas vera por nia asocio.

Feliĉan 2017!

*José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF*

# Enhavo

Salutvortoj	1
Informoj de la Estraro	3
Fundación Esperanto	6
Pri niaj grupoj kaj asocioj	7
25-a Internacia Semajno de Esperanto	10
76-a Kongreso de Esperanto Teruel	11
La legendo de la geamantoj de Teruel	13
Presentado de la bita eldono de D. Quijote en Esperanto	16
Alia universala Quijote	18
Presentado de poezio en Esperanto en neesperantistaj okazoj	19
Novaj gvidantoj de la belartaj konkursoj de UEA	20
Jubileo de Kajto Kvarope 2017	22
La 32 Arkones	23
Poezia angulo	26
Pri princino kaj papilio	27
Nuna Vikipedio	29
La branĉoj (tradukita rakonto)	31

---

## Noto de la Redaktoro

En la pasinta Boletín ni publikigis noton pri la Internacia Semajno de Kulturo kaj Esperanto en Katalunio, Cambrils, sed ni erare skribis la 23-an anstataŭ la 24-an. La venonta Semajno okazos la 25-an en la bela apudmara urbo Tossa de Mar, organizita de nova teamo. Ĝi komencos la 30an de septembro kaj finos la 7an de oktobro. Baldaŭ mi aperigos retpaĝon pri la evento kun ĉiaj detaloj.

Pro la abundo de novaĵoj en la unua Boletín de 2017, la daŭrigo de la artikolo de Antonio Marco Botella “Kronikoj pri la Tajfoj de Badajoz” aperos en la venontas numero.

# INFORMOJ DE LA ESTRARO

## KAMPANJO POR ALIĜO AL LA ASOCIO



Hispana Esperanto-Federacio lanĉis dum la fino de 2016 kaj komenco de 2017 kampanjon por aliĝo al nia asocio por la jaro 2017 en diversaj forumoj kaj sociaj retoj, kaj ankaŭ per letero al niaj anoj. Ni kreis retan formularon, multe pli facilan ol la ĝisnuna metodo, per la adreso <http://www.esperanto.es/inscripcion>.

La rezulto estis tre kontentiga, kaj aliĝis pluraj homoj, kelkaj junaj, aliaj eksaj membroj kiuj renovigis sian aliĝon, aliaj simpatiantoj kun emo kunlabori.

bori.

La kampanjo daŭros dum la unuaj monatoj, kaj do ni plu instigas niajn anojn kaj niajn grupojn inviti aliajn esperantistojn fariĝi membroj de HEF. Ni bezonas ĉies helpon por daŭrigi nian laboron.

Samtempe, dum la lastaj semajnoj de la jaro ni sendis mesaĝon al la anoj de HEF kiuj ne pagis sian kotizon dum la lastaj du tri jaroj, por konfirmi ĉu ili plu restas interesitaj resti membroj. Se vi estas unu el tiuj anoj, rimarku ke tiu ĉi estos la lasta “Boletín” kiun vi ricevos. Memoru ankaŭ ke se via problemo estas ekonomia, ni disponas je rabatita kotizo por homoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj, kaj ke vi simple povas kontakti la kasis-ton por tion deklari kaj interkonsenti pri la pago.

Ĉio ĉi taŭgos por aktualigi la datumbazon de la asocio, kiun ni nun ŝanĝadas. Profitu la okazon por aktualigi viajn informojn, kaze ke vi iel modifis ilin. Ekzemple, kaze ke vi ne ricevas nian elektronikan bultenon, tio eble signifas ke ni ne havas vian retadreson; tiukaze, sendu ĝin al [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es).

En tiu ĉi bulteno vi trovas la aliĝilon por la jaro 2017. Uzu ĝin por renovigi viajn informojn aŭ por kopii ĝin kaj instigi viajn amikojn aliĝi al la asocio.

Ne dubu! Ni estas neprofitcela asocio, kiu apenaŭ ricevas eksterajn helpojn, kaj nur dependas de niaj anoj por antaŭenigi Esperanton en nia lando. Ni bezonas ĉies kunlaboron.

## SERĈATA GRAFIKISTO

Hispana Esperanto-Federacio deziras krei aŭ renovigi nian informadan materialon kaj aliajn bildojn por diversaj eventoj, kaj por tio ni bezonas homon kun konoj kaj iloj pri grafikado. Ne estos tro multe da laboro, kaj temas pri volonta kunlaboro. Certe iuj el vi demandis vin, kion mi povas fari por Esperanto (kaj vi forgesis informi nin pri tiu via lerto). Jen ŝanco por kunlaboro.

Skribu al nia adreso [info@esperanto.es](mailto:info@esperanto.es)



## JARO ZAMENHOF

La jaron 2017 oni kunmemoros la 100an datrevenon de la morto de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la 14an de aprilo 1917 en Varsovio. En la tuta mondo oni planas diversajn aktivadojn por memori lian figuron. Eĉ la UNESKO, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la Edukado, la Kulturo kaj la Scienco, inkludis tiun datrevenon en sia listo de kunmemoroj al kiuj ĝi estas asociita, post la propono de la registaro de Pollando, kun apogo de tiuj de Germanio kaj Slovakio (<http://en.unesco.org/celebrations/anniversaries/2017/all?page=1>)

Hispana Esperanto-Federacio planas organizi kampanjon por kunmemori tiun ĉi datrevenon en nia lando. La programo ne estas ankoraŭ finredaktita, kaj ni atendas la kunlaboron de la anoj kaj la lokaj kaj regionaj grupoj por ĝin kompletigi. Ni planas proponi prezentadojn pri la figuro de Zamenhof kaj pri Esperanto, en diversaj institucioj, kaj ni instigas niajn anojn kontakti kun universitatoj, lernejoj, bibliotekoj, kulturcentroj, ktp, por proponi tiajn prelegojn.

Fakte, ni jam povas informi pri la unua konfirmita prezentado: la prezidanto de HEF prelegos pri Zamenhof en la “Casa Sefarad-Israel”, institucio kreita de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj por flegi la rilatojn kun la juda kulturo. Ĝia sidejo troviĝas en historia palaco en la strato Mayor de Madrido. La prelego okazos la 2an de februaro, je la 7a vespere, kaj evidente donos specialan atenton al la juda fono de la laboro de Dr. Zamenhof.

HEF ankaŭ deziras organizi ekspoziciojn dum tiu ĉi jaro en diversaj urboj. Ni profitos la panelojn jam kreitajn por antaŭaj okazoj, kiujn ni parte adaptos por tiu ĉi datreveno. Ni memorigas ke la transporto de la paneloj estos pagata de HEF, kaj ke la instalado estas tre facila, kaj do ni sugestas al la grupoj kaj individuaj aktivuloj kontakti instituciojn por proponi tiun ĉi ekspozicion. Kontakti kun ni por koni la detalojn.



Ni planas organizi simpozion/seminaron pri la figuro de Zamenhof kaj liaj kreaĵoj. Tio parte dependos de la subvencioj kaj apogoj ricevotaj, kaj do detaloj ne estas fiksitaj.

Ĉiukaze, ni dependas de ĉies apogo, por profiti tiun eksterordinaran okazon. En venontaj numeroj ni informos pli detale, sed dume, se vi havas ideojn kaj iniciatojn, ne hezitu kontakti kun la estraro.

## ŜANĜO DE STATUTO DE UEA

Kiel ni informis en pasinta Boletín, Universala Esperanto-Asocio organizis ĝeneralan voĉdonadon pri statut-ŝanĝo, por ratifi diversajn modifojn aprobitajn de la Komitato. Post nia tiama alvoko al ricevo de opinioj, la estraro de HEF kunvenis kaj decidis aprobi plejmulton de la ŝanĝoj, sed voĉdoni nee pri la propono pri sendependiĝo de la junulara sekcio TEJO. Tiu decido, adoptita post interna voĉdonado, ŝuldiĝis al la timo de kelkaj estraranoj ke tute sendependa TEJO povos esti pli malforta, antaŭ neatenditaj cirkonstancoj aŭ la ĝenerala malstabileco de junularaj asocioj.

La ŝanĝoj en la Statuto estis tamen aprobitaj per 7751 ĝis 8348 jesaj voĉoj el la 9054 esprimitaj voĉoj (1336 individuaj voĉdoniloj kaj 37 voĉdoniloj de la landaj asocioj kaj 5 voĉdoniloj de fakaj asocio), poŝte senditaj al la Centra Oficejo en Roterdamo, laŭ la informo de la gazetara komuniko de UEA, kiu aldonas la reagon de d-ro Mark Fettes, la Prezidanto de la asocio: “Ni estas feliĉaj, ke tiuj proponoj de nia Komitato ricevis la benon de niaj membroj. Ili inkluzivis plurajn necesajn paŝojn por modernigi la Asocion kaj faciligi la demokratian partoprenon de niaj membroj.”

## UZO DE LA SIDEJO FARE DE ESPERANTISTAJ ASOCIOJ

La esperantista asocio SAT-en-Hispanio petis rajti uzi la sidejon de HEF kiel propran sidejon, por leĝaj aspektoj. La estraro de HEF pritraktis tiun aferon en sia lasta kunveno de la jaro kaj decidis aprobi tiun uzon, kun difinitaj kondiĉoj. Samtempe, ni decidis informi la anaron, klarigante ke tiu decido estas principe pli malferma, kaj estas ankaŭ etendita al tiuj aliaj esperantaj asocioj kies celo estu disvastigi la Esperanton kaj petu la uzon de la sidejo en similaj cirkonstancoj.

## KONGRESOJ EN 2018

Ni memorigas ke UEA aprobis ke la Universala Kongreso de la jaro 2018 okazos en la urbo Lisbono, en Portugalio.

Tre ofte la fakaj asocioj profitas la okazon por organizi siajn kongresojn en apudaj landoj aŭ regionoj, dum la tagoj antaŭaj aŭ postaj al la datoj de la UK. En tiu ĉi kazo, ni jam ricevis kelkajn indikojn pri la dezirindeco organizi fakajn kongresojn, konferencojn aŭ renkontiĝojn en Hispanio dum tiu jaro. Dum la venontaj monatoj la estraro de HEF enketos ĉe la lokaj grupoj (ĉefe en urboj grandaj aŭ en la okcidento de la lando), por provi gastigi tiujn eventojn dum tiu jaro, kaj komenci la planadon.

Ĉu vi iam revis organizi internacian renkonton en via urbo? Jen ŝanco: kontaktu kun HEF por esplori la eblecojn.

# FUNDACIÓN ESPERANTO

## INFORMADO PRI 2016

La helpoj programitaj por 2016 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 412 de "Boletín" (okt-dec.2015) de HEF.

Kiel oni scias, ni disponas je tre modesta kvanto por helpoj. Sekve, ni decidis helpi al nur unu asocio.

Fine ni decidis destini al Grupo Esperantista de Teruelo "LIBERANIMO" 300 € pro organizado de E-kursoj kaj same konsiderante ke la grupo kreĝis en 2016 kaj ke ili prenis sur sin la respondecon organizi la Hispanan E-Kongreson en 2017.

Ni aparte kontentas pri la fakto ke en 2016, finfine aperis la bitumita eldono de Kihoto, libere alirebla. Ni memoru, ke en 1977 Fundación Esperanto publikigis la libran eldonon.

Krome, kiel kutime, en nia sidejo estis organizitaj E-kursoj por komencantoj.

## PROJEKTOJ POR 2017

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ la 30a de novembro de 2017.

Lastatempe, la elspezoj kreskis kaj la enspezoj malpliĝis. Tial, principe la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 300 €.

Lorenzo Noguero

(Sekretario de Fundación Esperanto)



FUNDACIÓN  
ESPERANTO


# PRI NIAJ GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## EKSPOZICIOJ PRI ESPERANTISTOJ EN BILBAO

En julio okazis ekspozicio kaj prezentado de libro pri tre grava historia esperantisto, la konsilisto de la unua aŭtonoma vaska registaro Juan Gracia. La libro, verkita de la historiisto Jon Penche, estis eldonita de la Publika Centra Servo de la Eŭska Registaro, kaj estas libere alirebla en la retejo de tiu institucio.

La prezentado okazis meze de la monato Aŭgusto en la Konferenca salono de la Hotelo Barceló de Bilbao, aranĝita de la Fondaĵo Ramon Rubial, kun arta prezentado de fotoj pri diversaj motivoj de la vivo de Juan Gracia, eĉ kun kovertoj de Esperantaj Kursoj, kaj la prezentanto estis la aŭtoro mem, kun ĉeesto de elstaraj Membroj de la Socialista Partio, familianoj kaj invititaj membroj de la Esperanta Grupo el Bilbao, inter ili nia veterana amiko Eduardo Larrouy, kun kiu interparolis la Sekretariino de PSE, Idoia Mendia. Partoprenis entute cirkaŭ 100 ĉeestantoj.

Fine de Oktobro inaŭguriĝi Bilbao alia ekspozicio pri esperantisto, la inĝeniero kaj sciencisto Leonardo Torres Quevedo, per prelego pri lia figuro kaj graveco. Kiel sciante, Torres Quevedo estis granda defendanto de la lingvo Esperanto. Dum la jaro 2016 oni organizis diversajn agadojn pri li, ĉar ĝuste tiam fariĝis 100-jara la Spanish Aerocar, la plej antikva ankoraŭ funkcia transportilo super la Niagaraj Akvofaloj, kiun li dizajnis.



## 228 EŬROPAJ VIRINOJ FAMILIARIĜAS KUN ESPERANTO EN SEVILO

La pasintan 15-an de oktobro okazis senprecedenta evento en la historio de Esperanto en Sevilo.

“Pop in the City” estas speco de turista ĝimkano, kie ĉ. 400-700 virinoj, devenantaj el la tuta Eŭropo, trakuras urbon frontante ĉiajn sportajn, kulturajn, artajn kaj solidarajn provojn. Ĝi disvolviĝas 4 fojojn jare, ĉiam en malsama eŭropa urbo, kaj ĉifoje la elektita urbo estis Sevilo.

En tiu ĉi eldono *Pop in Sevilla 2016*, unu el la pruvoj surprizigaj atendis ilin en la najbara centro Pumarejo, situata en la samnoma palaco. Ilia celo estis ĉeesti 25-minutan intensivan lecionon de enkonduko en Esperanto, kaj sekve sukcesi trapasi ekzamenon pri tradukado al tiu ĉi lingvo. La kursoj de Esperanto estis instruitaj de la Sevila Esperanto-Asocio. Entute, dum la ok horoj kiujn daŭris la evento, ricevis la lecionojn 228 virinoj, precipe en la franca, sed ankaŭ en la angla kaj hispana lingvoj. Venis partoprenantoj el Francio, Belgio, Svislando, Britio kaj eĉ Honkongo.

Eĉ se plejmulto el ili praktike ne konis la ekziston de Esperanto antaŭ la evento, la reagoj de la partoprenintoj estis tre pozitivaj, kaj pluraj lecionoj finiĝis per laŭta aplaŭdo, same kiel la mencio de la defio dum la nokta festo kie oni disdonis la premiojn.

Kiom da ĉeestintoj daŭrigos la lernadon de Esperanto? Kiom el ili fariĝos fortaj defendantoj de la lingvo, ĉu lernonte ĝin aŭ ne? Neniu scias, sed, kiel asertas la retejo de la evento: *“Dans le magnifique patio Pumarejo, nos participantes ont essayé de se dépatouiller en Esperanto. Quel bonheur de prononcer sa première phrase internationale !”*



## PREZENTADO DE ESPERANTO EN CHESTE

La semajnfino de la 10-a kaj 11-a de decembro, estis organizita en la urbo Cheste (Valencio), kies granda esperantista tradicio estas sufiĉe konata, la 1-a Foiro de la Asocioj, kun la partopreno de la loka esperantista grupo "Lumradio".

La sabaton okazis prelego pri Esperanto, gvidata de la usona esperantisto, Dennis Keefe, kiu rakontis pri sia internacia sperto per la internacia lingvo.

## CELEBRADO DE LA INTERNACIA TAGO DE ESPERANTO

Kiel tradicie, la Esperantistaj grupoj celebris la Internacian Tagon de Esperanto, la 15-an de decembro, ĝuste dum tiu tago, ĉu dum la antaŭaj aŭ postaj tagoj.



La unua estis la nova grupo de Teruelo, jam la 1-an de Decembro. En la semajnfino antaŭ la 15-a, kunvenis por festi la grupoj de Zaragozo kaj de Santandero.

La grupo de Terrassa (Katalunio) organizis ekspozicion la 15-an matene. Vigo, Sevilo kaj Madrido kunvenis por vespermanĝi, pli-malpli formale, la 15-an mem, Barcelono la 16-an, Bilbao kaj Valencio la 17-an.



# 25-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

De la 30-an de septembro ĝis la 7-an de oktobro 2017

HOTEL DON JUAN  
c/ Barcelona, 22  
17320 TOSSA DE MAR  
Telefono: 34 972340244

Kiel alveni:

Aŭte: AP7 koordinatoj: latitudo 41.723098  
Longitudo 2.933339

Buse: Flughaveno de Barcelono al Tossa de Mar:

Horaroj: Barcelona 9.50 alvenas en Tossa de Mar 12.05  
“ 16.35 “ “ 18.50

Prezo: 14.25 Eŭroj

Flughaveno de Girono al Tossa de Mar

Horaroj: Girono 10.00 alvenas en Tossa de Mar 10.55  
“ 14.30 “ “ 15.25

Prezo: 10 eŭroj iro

16 eŭroj iro kaj reveno

Bus-stacio de Barcelono Nord al Tossa de Mar

Horaroj: 9.15 – 10.45 - 12.00 - 17.30 - 20.30

Prezo: 12.15 eŭroj





FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
DISEÑADA POR ANA TORRES



## **76-A KONGRESO DE ESPERANTO TERUEL, 23-a de junio ĝis 25-a de junio 2017**

### **LA ORGANIZANTOJ KAJ LA KONGRESEJO**

*Libermanimo*, Esperanto-asocio de Teruel, kaj HEF (Hispana Esperanto-Federacio), invitas vin partopreni en la 76-a Hispana Kongreso de Esperanto, de la 23-a ĝis la 25-a de junio, 2017.

La kongresejo konsistas el la modernaj konstruaĵoj de la Universitato de Zaragoza, (“Campus de Teruel”), sed multaj agadoj okazos tra la stratoj kaj la ĉirkaŭaĵoj de Teruelo.

### **LA URBO**

Teruel estas malgranda urbo, la plej malgranda provinca ĉefurbo de Hispanio, kun pli malpli 35.000 loĝantoj. En la urbo elstaras la malnova kvartalo, tre damaĝita dum la Inter-civitana Milito, sed tre rekonstruita sen perdi sian originalan esencon. Ankaŭ elstaras en la urbo la mudeharaj monumentoj, deklaritaj de la UNESCO “Heredaĵo de la Homaro”.

Ĉirkaŭ Teruel ekzistas iuj vidindaj vilaĝoj de granda beleco, kiel Albarracin kaj Rubielos de Mora. La provinco Teruelo nun alfrontas la malfacilan defion de senpopoligo.

### **LA KONGRESA KOMITATO**

Prezidanto: Alberto Granados

Vicprezidanto: Eduardo Dolz

Sekretario: Blanca Villarroya kaj Tomás Civera

Kasisto: Javier Martín

### **LA MOTIVO**

Dum la jaro 2017 Teruel solenas la 800-an datrevenon de la popola legendo konata kiel "Geamantoj de Teruel". La kongreso koincidas kun tia celebrado. Do, la temo de la kongreso estas: "Teruelo, urbo de geamantoj, amantoj de Esperanto".



En 2017 la esperantistoj ankaŭ solenas la centjariĝon de la forpaso de Zamenhof kaj la 130-an datrevenon de la apero de lia Unua Libro.

## **LA PROGRAMO**

Dum la kongreso ni volas prezenti Teruelon al esperantistoj kaj, samtempe, prezenti Esperanton al teruelanoj. Do, ni organizos iujn agadojn en la hispana lingvo dum la tagoj antaŭ la komenco de la kongreso. Ni ankaŭ inkludos agadojn rilatajn al la provinco de Teruel, al ĝiaj turistaj rimedoj, al ĝia demografia situacio...

La programo inkludos muzikajn recitalojn, eble iom da teatro, prelegoj pri Esperantomovado en Aragono, ekspozicioj... kaj iujn surprizojn kiujn ni ne volus malkaŝi.

Ni antaŭvidas aliajn aktivaĵojn antaŭ kaj post la tagoj de la kongreso, pri kiuj ni informos pli detale en postaj komunikoj.

## **TURISMA PROGRAMO**

La kongresprogramo inkludos turismajn vizitojn tra la stratoj de Teruelo. Ni vizitos ĝiajn mudeharajn monumentojn kaj ĝiajn modernismajn konstruaĵojn. Ni ankaŭ vizitos Albarracín. Eble, ni eĉ organizos noktan astronomian observadon dum la nokto de Sankta Johano.

## **GASTIGADO KAJ TRANSPORTO**

Ni rekomendas al la partoprenantoj serĉi loĝadon baldaŭe. Teruel havas grandan kvanton da hotelaj lokoj, sed la datoj de la kongreso estas tre menditaj de la turistoj kiuj alvenas por viziti la urbon.

Teruel estas urbo ne malproksima de la grandaj ĉefurboj de Hispanio, sed kun kelkaj malfacilaĵoj por publika transporto. Per fervojo, oni povas alveni el Zaragozo aŭ el Valencio. Per buso oni povas alveni el Zaragozo, Valencio, Madrido aŭ Barcelono. Per aŭto eblas veni tra nun tre bona kaj rapida aŭtoŝoseo el Zaragozo kaj Valencio. Distanco el Madrido estas 300 km (ĉ. 3 horoj per aŭto) kaj el Barcelono 425 km (ĉ. 4 horoj).

## **KONTAKTO**

La informoj aperos ĉe la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso>.

Vi ankaŭ povas kontakti kun la organizantoj per la adreso [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es)

## **ANTAŬ KAJ POST-KONGRESO**

Krom la Kongreso mem, kiu disvolviĝos inter la 23-a kaj la 25-a de junio, la organizantoj nun pretigas kelkajn aktivadojn por la homoj kiuj povos resti en Teruel dum iom pli da tempo. Konkrete, la 22-an de junio ni organizos kurson por lernantoj kaj turisman viziton. La 26-an kaj 27-an de junio, la junulara sekcio HEJS planas organizi seminariojn, en kunlaboro kun TEJO, por aktivula trejnado, kaj konekse kun ĝi la LKK planas postkongresajn aktivadojn. Ni informos pri detaloj dum la venontaj semajnoj, kaj en la venonta numero de Boletín.

## LA LEGENDO DE LA GEAMANTOJ DE TERUEL

La venontan jaron 2017, Teruel solenos la okcentan datrevenon de la legendo de la Geamantoj de Teruel. Oni supozas ke estis dum la jaro 1217 kiam la amrakonto de du junaj geteruelanoj tragike finiĝis antaŭ ol ĝi komenciĝis.

Ĉiuj legendoj havas iom da realeco. Ĉiuj historiaj studoj inkludas iomete da fantazio. Estas konvene ke ni apartigu tiujn du aspektojn: Unue ni legos la belan legendon kaj ni kredos ĝin. Poste, ni agos tiel, kiel seriozaj historiistoj, kaj analizos la realajn datumojn.

La belega legendo

Bonvolu veni kun mi al la komenco de la dektria jarcento. La juna kaj tre bela teruelano Izabela de Sekura estis filino de riĉa komercisto. Iutage, la ĉarma Diego de Marci-lla kruciĝis kun ŝi en la merkato kaj unuavide amo naskiĝis inter ili. Dirite, farite, ili fianĉiĝis. Sed Diego estis malriĉa (la senfina problemo pri la sociaj malegalecoj) kaj la patro de Isabel neis al ili sian benon, ĝis Diego kapablu plibonigi substance sian ekonomian situon. Diego petis al Izabela ke ŝi atendu lin dum kvin jaroj. Li promesis al ŝi reveni sufiĉe riĉa tiel, kiel necese por peti ŝian manon.

Dum Diego bataladis la maŭrojn, atingante famon kaj riĉecon, la patro de Izabela decidis ŝin edzinigi kun riĉulo Petro de Azagra. La kvin jaroj estis jam pasitaj kaj, mankante novaĵojn pri Diego, Izabela devis akcepti Petron kiel edzo.



Kiam Diego revenis Teruelon, li trovis ke en la urbo ĵus estis festita grandan nupton. Li terurita konstatis ke precize estis lia amatino kiu ĵus geedziĝis. La dialogo inter Diego kaj Izabela, kvankam okazita en la nupta dormoĉambro, limiĝis nur al malmultaj frazoj, ĉastaj sed pasiaj: "Kisu min, mia amo, aŭ mi mortiĝos" "Mi ne volas, mi apartenas al aliulo". Kaj Diego falis senviva.

La sekvan tagon okazis la funebraĵoj de Diego, kies korpo estis aranĝita sur katafalko en la preĝejo de Sankta Petro. Vualita virino, Izabela, alproksimiĝis por kisi lin, kaj tiu kiso kaŭzis ŝian morton.

Tiel impresitaj restis la du familioj, ke ili decidis entombigi la du korpojn kune en la ekzakta loko kie ili mortis. La jaro estis 1217. Diego kaj Izabela ankoraŭ amas unu la alian –mortitaj sed ĉiutage pli enamiĝintaj- post 800 jaroj.

Ĉi tiu rakonto estas belega, ĉu ne?



#### Historiaj datumoj

Mi provos ke la historiaj datumoj ne forprenos romantikismon el tiel bela legendo.

En 1553 du korpoj estis trovitaj en la kapelo de "San Cosme y San Da-

mián", en la preĝejo de Sankta Petro, posedaĵo de la familio Marcilla. La kadavroj estis elmontritaj kaj denove enterigitaj. Estas nedubbla fakto ke la historio pri la Geamantoj cirkulis kiel legendo aŭ kiel vera historio en Teruel dum la komenco de la deksepa jarcento. En 1619, la poeto kaj notario Joan Yagüe de Salas eldonis poemon titolita "Tragika Epopeo" bazita sur tiu rakonto. Poste, kiel notario kiu li estis, li ordonis elterigi kaj eksoni la korpojn kaj publikigis "Notarian Protokolon" en kiu atestis pri dokumento, datita en 1555,



kiu certigis la malkovron de la korpoj kaj iliaj identecoj. La teruela historiisto Fernando López Rajadel kredas ke ĉio devenas el trompaĵo farita de membroj de la Marcilla familio, kiu inventis la rakonton por tiumaniere laŭdi lian ĉaston. Li kredas ke ili enskribis la historion en familian kodekson de komence de la dekkvara jarcento. Alia eblo estas ke ĉiu estis kreaĵo fare de Yagüe de Salas, por iel reklami lian verkon.

La legendon oni ripetadis en literaturo, arto kaj muziko: Tirso de Molina, Hartzenbusch, Juan Muñoz Degrain, Tomás Bretón... Kaj la korpoj estis elmontritaj laŭ diversaj manieroj: starante, kuŝitaj, videblaj, ĉe pavilono, en ŝranko, kovritaj, ktp. Ĉirkaŭ 1955, Juan de Ávalos skulptis la nunan alabastran sarkofagon. En la jaro 2005 estis inaŭgurita la nova konstruaĵo kiu enhavas la maŭzoleon, aneksita al la preĝejo de Sankta Petro.

Scienco respektas nenion: En 2004 oni faris la datadon de la restaĵoj; du homoj kiu mortis komence de la dekkvara jarcento. Ili mortis almenaŭ cent jarojn post la morto de la Geamantoj.

## LA FESTO DE GEAMANTOJ



Nun ni devas ripozi, forgesi realon kaj denove mergi nin en la atmosferon de Teruel dum la dektria jarcento. Kiam la tria semajfino de februaro alvenas, la teruelanoj freneziĝas pro amo: ni serioze kredas nian propran rakonton, kaj ni vivas la historion de la geamantoj. Rimarku ke mi ne diris "ni rekreas ilian historion" sed "ni vivas ĝin": ni ĝin sentas, ni ridas kaj ploras kiel la prateruelanoj faris, ni ĵuras eternan amon ŭnu al alia kaj ni ŝtelas kisojn al la vivo kaj al la morto.

Kaj tio ĉio, ĉiujare, nepre.

Ĉiu komenciĝis en 1997, kiam malgranda trupo de aktoroj decidis rekrei la historion de la amantoj en la stratoj, vestitaj kun mezepokaj kostumoj. La nova festo tiel kreskis ke ni povus diri ke Teruel malaperas dum kelkaj tagoj. Ni iras al la estinteco, ni fariĝas mezepoka urbeto. Se vi venus dum tiuj tagoj, vi estos bonvena, sed bonvolu ne forgesi ke vi neniam trovos nin. En nia loko estos strangaj homoj de la pasinteco. Anstataŭ Teruel, vi trovos urbon el la dektria jarcento.

Kaj kiu ne volas reveni al la estonto.

Alberto Granados

## PREZENTADO DE LA BITA ELDONO DE DON QUIJOTE EN ESPERANTO, ĈE LA ĈEFA SIDEJO DE L'INSTITUTO CERVANTES

La 15an de decembro, ĝuste en la Internacia Tago de Esperanto, okazis la kulmino de la projekto “Don Quijote 2016” de Hispana Esperanto-Federacio: en la sidejo de la Instituto Cervantes, la plej grava oficiala institucio por la promocio de hispana kulturo, en Madrido, estis prezentita al la ĝenerala publiko la elektronika eldono de la Esperanta traduko de *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*.

Kiel ni jam informis en pasintaj numeroj de *Boletín*, HEF disponigis al ĉiuj esperantis-toj, libere kaj senpage, la elektronikan eldonon de la traduko al la internacia lingvo de la plej grava verko de la hispana literaturo. Tiun eldonon ni jam enretigis kaj prezentis al la esperantistaro la pasintan 1-a de julio okaze de la 75 Hispana E-Kongreso en Herrera del Duque, kaj poste ankaŭ dum la Universala Kongreso en Nitro (Slovakio).

La oficialan prezenton al la ĝenerala publiko ni rezervis por koincidi kun la Monda Tago de la Libro en Esperanto, aŭ simple la Tago de Esperanto, kiam tutmonde festas la kulturon kreitan en la internacia lingvo, kaj ni sukcesis ĝin organizi en la ĉefa sidejo de Instituto Cervantes, en historia konstruaĵo en la strato Alcalá, en Madrido.






El Instituto Cervantes y la Federación Española de Esperanto  
tienen el placer de invitarle a la

**Presentación de la edición digital de la traducción de  
*Don Quijote de La Mancha* al esperanto**

que se celebrará el jueves, 15 de diciembre de 2016, a las 19.00 h.

En el acto intervendrán **Beatriz Hernanz Angulo**, directora de Cultura del Instituto Cervantes,  
**José Antonio del Barrio**, presidente de la Federación Española de Esperanto,  
**Miguel Gutiérrez Adúriz**, escritor y editor de obras en la lengua internacional esperanto, y  
**Ana Manero**, responsable de la Biblioteca Digital Bitoteko de la  
Federación Española de Esperanto.



**Instituto Cervantes, c/ Barquillo, 4 - 28014 Madrid**

La aranĝo estis prezentata de la direktoro de kulturo de Instituto Cervantes, Beatriz Hernanz, kiu salutis en Esperanto, kaj poste faris tre ampleksan omaĝon al la kreinto de Esperanto, D-ro Zamenhof. Poste José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, prezentis Esperanton kaj la verkon, kaj faris mallongan vojaĝon tra la diversaj provoj traduki *Don Quijote* al Esperanto. Miguel Gutiérrez Adúriz, verkisto en Esperanto kaj kunordiganto de la projekto de bitigo de la verko, priskribis la projekton de eldonado, kaj aliajn planojn de HEF pri prezentado de la hispana literaturo en Esperanto. Ana Manero, respondeculo de la Bitoteko de HEF, parolis pri tiu bita biblioteko, kaj pri la kulturaj projektoj de la Federacio. Sekve, Manolo Parra deklamis pecon de la verko, por ke la neesperantistoj ĉeestantaj povu aŭskulti kiel ĝi sonas. Fine de la aranĝo la prezidanto de HEF donacis libron en Esperanto al la biblioteko de l' Instituto, kiun ricevis la respondeculo de la elektronika biblioteko de tiu institucio.

La informo pri la prezentado aperis en la oficiala retejo de la *Ŝtata Komisiono pri la 400 datreveno de la morto de Miguel de Cervantes*, kiu akceptis nian projekton kiel unu el la eroj de la oficiala programo. Ĉeestis kvardeko da homoj, kaj la tuta prezentado estis filmita de la Instituto, kaj estos baldaŭ alirebla en la reto.

En la sama tago, la elektronika biblioteko de la Instituto Cervantes ekgastigis la dosieron kun la bita eldono. Liŝilojn al tiu eldono, en la diversaj gastigejoj, oni povas trovi pere de la retadreso <http://www.esperanto.es/quijote>.

*La estraro*

## ALIA UNIVERSALA QUIJOTE

La 12an de decembro, en la sidejo de la Nacia Biblioteko de Hispanio, en Madrido, estis prezentita la verko *El Quijote universal, Siglo XXI*, kiu entenas tradukojn al 150 lingvoj kaj lingvovariantoj de diversaj ĉapitroj de la verko *Don Quijote*, kelkaj el ili unuafoje. Inter ili troviĝas, kompreneble, ankaŭ Esperanto (konkrete, la lasta ĉapitro de la unua parto).

La libro estis eldonita de la asocio “La Otra Andalucía”, la Fakultato de Filologio de la Universitato Complutense de Madrido kaj la librovendejo “Antonio Machado Libros”, okaze de la kunmemoroj de la 400a datreveno de la forpaso de Miguel de Cervantes.

Ĉe la presentado oni legis pecojn en du dekoj da lingvoj. La pecon en Esperanto legis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio. La tutan aktivajon oni povas spekti en la retejo de la Nacia Biblioteko.

Ankaŭ en la Nacia Biblioteko okazis komence de oktobro alia multlingva prezento de *Don Quijote*, en kiu blinduloj el diversaj landoj legis pecojn en pluraj lingvoj.

La esperantisto Pedro Zurita helpis en la organizado de evento, kaj mem legis en la astura lingvo, kaj li peris kunlaboron de esperantistino el Serbio, kiu legis en Esperanto. La tutan prezenton eblas spekti en: [https://youtu.be/n3D4\\_UyWXnI](https://youtu.be/n3D4_UyWXnI).



## PRESENTADO DE POEZIO EN ESPERANTO EN NEESPERANTISTAJ OKAZOJ

Dum la lastaj monatoj okazis diversaj prezentadoj de poezio, en neesperantista etoso, en kiu Esperanto elstare rolis.

La pasintan 15-an de novembro en la librovendejo “La Central” de Madrido, okazis prezentado de la revuo pri soci-kritika poezio "Caja de resistencia", kies dua numero enhavas poemon de la poeto Miguel Fernández, en la esperanta originalo kaj en hispana traduko. Dum tiu prezentado Miguel Fernández deklamis du poemojn, tiun sian kaj alian de Suso Moinhos, kiu estis publikigita en la unua numero de la revuo. Li deklamis unue en Esperanto kaj poste en la hispana, kio ricevis tre pozitivajn reagojn de ĉeestantoj.



La 12an de decembro okazis ankoraŭ alia deklamado: en omaĝo al la poeto Marcos Ana, ĵus forpasinta, fare de la asocio "Marx Madera" en Madrido (kvartalo Usera). La poetino María Ángeles Maeso deklamis hispane la poemon "Yo denuncio", kaj poste Matilde Montero deklamis la saman poemon esperante ("Mi denuncas") laŭ la traduko de Miguel Fernández (poemo aperinta en la antologio *Poezio: armilo ŝargita per futuro* eldonita de SATeH en 2013).

Ankoraŭ alia poezia deklamado estis organizita en Galegio: en Santiago de Kompostelo la 30-an de novembro, la poemo “A Cabeleira” (“La hararo”), de Claudio Rodríguez Fer, estis legita en 60 lingvoj, komencante per la originala galega kaj finiĝante per la versio en Esperanto. La traduko al la internacia lingvo ŝuldiĝas al Diana Conchado, kaj la poemo estis legita de la prezidanto de la Galega Esperanto-Asocio, Xosé Lourenzo Vidal.



## DU HISPANAJ ESPERANTISTOJ GVIDOS LA BELARTAJN KONKURSOJN DE UEA

*La novaĵo, kiu ĝojigis nin aparte kaj profunde, aperis la 28an de la pasinta novembro kiel gazetara komunikado de UEA: Miguel Fernández kaj Miguel G. Adúriz estas la novaj Prezidanto kaj, respektive, Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA. La Redakcio de Boletín esprimas al ni kaj du karaj Miguel'oj plej ardan gratulon kune kun nia fiero, ke iliaj eksterordinaraj literaturaj kaj aliartaj kvalitoj, ĝuataj de ni hispanaj e-istoj i.a. kongreso-post-kongrese, estas laŭmerite agnoskitaj altnivele kaj internaciskale. Miguel kaj Miguel, gratulegon!*

*Jen la menciita gazetara komunikado de UEA:*

Novaj gvidantoj por la Belartaj Konkursoj de UEA

La Estraro de UEA nomumis, per unuanima decido, la novan Prezidanton kaj la novan Sekretarion de la Belartaj Konkursoj de UEA: Miguel Fernández Martín kaj Miguel Gutiérrez Adúriz.

Kun granda dankemo al la antaŭa Prezidanto Humphrey Tonkin kaj al la antaŭa Sekretario Michela Lipari pro ilia multjara engaĝiĝo, ni deziras bonan laboron al la novaj gvidantoj, kies biografiaj notoj troviĝas sube.

Miguel Fernández Martín naskiĝis en Granado (Hispanio), en 1950. Tie li studis, krom la abiturienteco, solfeĝon kaj kant-arton. En 1968, li transloĝiĝis al Madrido kaj ekstudis en ĝia Politeknika Universitato. Esperantistiĝis en 1980. Inicitinto de la *Lirikaj Festoj de HEF* kaj de la kolektivaj spektakloj *Vivu la teatro!* kaj kunfondinto de la Ibera Skolo aŭ Ibera Grupo de E-verkistoj. Gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj en la Internaciaj Floraj Ludoj. Kunlaboras en diversaj revuoj, inter ili *Beletra Almanako*, *Sennaciulo*, *Sennacieca revuo* kaj *Boletín* de HEF.

Aŭtoro de la lirika-muzika spektaklo *La profil' de viaj spuroj* kaj de la teksto de samnoma kantato, la unua pri neesperanta temo en la historio de Esperanto, kun muziko de Pedro Vilarroig, premierinta en 1993, en la Palaco de la Muziko de Valencio, kadre de la 78-a UK. Nuntempe Fernández tenoras ĉe la madrida plektr-orkestro *Calle del Barquillo*.



Ĉefaj verkoj:

- poemkolektoj *Ampoemaro* (aperinta kadre de *Ibere libere*) kaj *El miaj sonoraj soloj*;
- rakontoj en *Ekstretoj* kaj la novelkolekto *La vorto kaj la vento*;
- eseoj-prelegoj *Sur la spuroj de Federico García Lorca* kaj *Konfesinde: ni vivis kaj plu vivas* (*La Ibera Grupo: dudek jaroj da amikeco kaj kreado*); tradukoj *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba*, teatraĵoj de Federico García Lorca, *Ĝis tagmezo alvenos*, novelo de Ignacio Aldecoa, *Miguel Hernández, poeto de l' popolo*, komentita antologio de poemoj de Miguel Hernández, *Poezio: armilo ŝargita per futuro*, komentita antologio de hispanlingva poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia, *Bohemiaj lumoj*, komentita teatraĵo de Ramón María del Valle-Inclán, *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*, komentita liberecana antologio surbaze de tekstoj de Federica Montseny kaj Dolores Marin, *Nova mondo en niaj koroj*, elmonro el nuntempaj hispanaj kritikaj poetoj.

Miguel Gutiérrez Adúriz (pseŭdonime: Liven Dek, Svena Dun, M. Zocato, ktp) naskiĝis en 1950 kaj estas kemia inĝeniero.



Kiel verkisto, li estas aŭtoro de diversaj noveloj - el kiuj pluraj disponeblas en diverslingvaj tradukoj -, precipe en la verkoj *Ekstretoj*, *Ne ekzistas verdaj steloj* kaj en la libroserio *Sferoj*. Liaj poemoj aperis en *Ibere libere*, komuna poemaro de la Ibera Skolo, kaj dise en diversaj revuoj. Li tradukis en Esperanton *Los niños tontos* (La stultaj infanoj) de A. M. Matute, *Ombroj sur verda pejzaĝo* de M. Llano, *Platero y yo* (Platero kaj mi) de J. R. Jiménez, kaj kontribuis per siaj tradukoj al pluraj aliaj libroj kaj revuoj. Kiel preleganto kaj gvidanto de literaturaj kursoj, li partoprenis en diversaj seminarioj kaj kongresoj.

Grafike li kontribuis al la Esperanta kulturo per la dezajno de librokovriloj, ekzemple por la serio *Originala Literaturo* de IEM. Kiel eldonisto, li kreis plurajn libroseriojn (*Sferoj*, *Hispana Literaturo* ktp), kaj publikigis verkojn de aliaj aŭtoroj. Krome, li establis kaj administras kelkajn plene Esperantajn jutubajn kanalojn, kiujn li nutras per memfaritaj kulturaj filmetoj diverstemaj. Lama membro de la Akademio de Esperanto, li verkis la dudirektan vortaron *Amika* kaj lernolibron de Esperanto por hispanlingvanoj.

La Redakcio

## JUBILEO DE KAJTO EN 2017



Dum la 76a Hispana Esperanto-Kongreso en Teruel okazos eksterordinara jubilea koncerto de Kajto Kvarope.

La grupo Jes, Kajto komenciĝs... kvarope en 1987,...poste daŭrigis duope, ...kaj nun en 2017 jubileos kvarope dum la teruela E-Kongreso.

Ankie, Nanne, Marita kaj Marian ege ĝojas anonci la 30 jaran-Jubileon de

Kajto kaj invitas vin partopreni en sia koncerto dum la 76a HEK en Teruel, inter la 23a kaj la 25a de junio, 2017.

Aliĝu al la 76a Hispana Esperanto-Kongreso, venu al Teruel, la geamantoj, Kajto kvarope kaj centoj da geamikoj atendas vin.



## La 32-a ARKONES 23. - 25. 9. 2016



La antaŭlastan semajnon de septembro jam la 32-an fojon okazis en Pollando en la urbo Poznano la tradiciaj ARTaj KONfrontoj en ESperanto (ARKONES). La aranĝo okazis en fervojista kulturdomo tute proksime de la bela urbocentro. Partoprenis ĝin 208 esperantistoj el 21 landoj.

En tri tagoj la organizantoj sukcesis proponi riĉegan programon: trideko da prelegoj, filmoj, koncertoj, spektakloj kaj aliaj prezentadoj. En la koridoro la partoprenantoj povis rigardi ekspozicion "Woodstock 2016 - Multkultura Vilaĝo". La nivelo de prezentitaj programeroj estis alta



danke al kontribuo de konataj profesoroj kaj eminentuloj el la interlingvistikaj studoj ĉe la universitato UAM de Poznano, kiuj la aranĝon ankaŭ partoprenis. La libroservo proponis librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Surloke funkciis bufedo kun kafejo, kie la ĉestantoj povis refreŝiĝi per biero kaj ne tro koste manĝi



Listigo de programeroj ne sufiĉas por priskribi la tutan aranĝon. Okazis primovada kunveno de la pola E-junularo, kurso pri unua helpo. Estis prezentita la libro *Memoraĵoj de kampara knabo*, verkita en la galega fare de Xose Neira Vilas en 1961 kaj tradukita en Esperanton de Suso Moinhos. Oni parolis pri la greka krizo, pri lingva diverseco, pri apliko

de la 15-a regulo, pri bliss-a skribo, pri feroaj dancoj kaj spritaj splitoj, pri Beletra Almanako, pri amo de la vidpunkto de psikologo, pri projekto de Esperanto-domo en Katmanduo, pri sekreto de abeloj, pri kuirarto de la antikva Romo kaj pri aliaj interesaj temoj. Paralele kun Arkones okazis unu-semajna trejnado konektita kun la projekto ERAZMUS+ en kiu partoprenis 3 Germanoj, 3 Slovakoj kaj 7 Poloj. Ĝi estis gvidata de Katalin Kováts kaj Silvain Lelarge. La projekto celas eduki venontajn instruistojn kaj aktivistojn de Esperanto. Tre grandan sukceson havis la teatraĵo *La kredito* prezentita de Georgo Hanzlik kaj Saša Pilipoviĉ.



Pri meritoj de Michel Duc Goninaz kaj Detlev Blanke, kiuj bedaŭrinde forpasis ĉi-jare, omaĝis Ulrich Lins, Barbara Pietrzak, Probal Dasgupta kaj Katalin Kováts subgvide de Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor. Sojle de Zamenhof-jaro 2017 parolis Barbara Pietrzak kaj pri digna festado de la sama afero internacie

en Germanio kaj Pollando parolis Johano Pachter.

La organizantoj zorgis pri altnivela muzika programo okazinta en la granda salono *Spegulejo*. Ni spektis koncertojn kaj aliajn amasanj aranĝoj kiel ĉendancado kaj filmprezentadoj. La unuan vesperon ni povis aŭskulti altnivelan piankoncerton de Joachim Kolpanowicz. Mikaelo Bronŝtejn prezentis kantojn de rusiaj bardeoj kaj Tomio Frejarö gitarludis kaj kantis. Sekvan tagon prezentiĝis kaj koncertis sur scenejo la ensemblo "E-familio kaj Gosia Sarata", kies junulara parto kantis kelkajn kantojn kaj kantigis la publikon per popularaj konataj kantoj.

Dum la tradicia miel-vespero ni estis regalitaj per medo. Varia prezentado de muzikaĵoj ne elrevigis la partoprenantojn kaj instigis ilin al dancado je la fino. Prezentiĝis arkonesa koruso, kantis Zuzana Kornicka. El Berlino venis ensemblo "Klezmorim Sennomaj" kaj la vespero finiĝis per energiplena koncerto de duopo Slezak.

ARKONES estas festivalo, kiun partoprenas konataj artistoj el Esperantujo kaj la vesperaj programeroj abundas je kvalitaj koncertoj. Ĝi estas bonetosa kaj kulturplena aranĝo. Al la bona evento ankaŭ kontribuas kutime belega aŭtuna vetero.

*Liba Gabalda*



## POEZIA ANGULO

bonvenon al la nova jaro  
de l' blank-eŭropa kalendaro;  
al morto de demokratio  
kaj findetruo de Sirio;  
al zombiiga mon-obsedo  
kaj neniigo de l' planedo;  
al mondo damne malnatura  
por infanaro senfutura.  
bonvenon en la ĝustan jaron  
por adiaŭi la homaron.



Jorge Camacho

---

### NEKROLOGE



Nia samideano Francisc Mas, la fotisto, kvankam li ne parolis Esperanton li estis unu el la plej entuziasmaj homoj pri la devastigo de nia lingvo. Li ĉiam identiĝis kiel esperantisto per sia dorsosakon, en kiu li kumportis sian nedisigeblan fotilon por foti ĉiujn esperantajn renkontiĝojn.

Lia malavareco ne havis limon, kiam li faris raportaĵon, dum la sekva renkontiĝo li nepre donacis fotokopiojn al ĉiuj partoprenantoj. Li neniam akceptis ian ajn pagon.

Danke al Francisc la Internaciaj Esperanto-Semajnoj kaj la esperantaj babiladoj estis historie fotitaj.

Kara samideano kaj amiko restu paco. Ni elkore memoros vin.

---

## PRI PRINCINO KAJ PAPILIO

La mistera princino de la titolo rilatas al fama poemo de Rubén Darío “Sonatina”, publikigita en *Prosas profanas y otros poemas [Profanaj prozoj kaj aliaj poemoj]* (1896). Tiu famega poemo por hispanlingvanoj (elstara monstro de modernisma stilo) estis tradukita al Esperanto en diversaj versioj. La papilio tie aperanta povas esti simbolo de la animo kiu aspiras al eliro al libero.

Kurioze, tiu poemo aperis komplete en esperanto en romano de Juan Antonio de Zunzunegui “El barco de la muerte” [“La ŝipo de la morto”] (1945). En tiu romano enestas multaj komentoj pri esperanto kaj esperantistoj (eble la neesperanta romano kun pli da mencioj). Oni povas foliumi ilin en la tt-paĝo de HEF, en la sekcio: “Qué es” > Literatura > Menciones literarias.

La versio en Esperanto de tiu poemo (en traduko de Félix Díez) jam aperis en la “Boletín del 2º Congreso de esperantista ibéricos” [2-a Iberia Kongreso kaj 4-a Hispana Kongreso] okazinta en Bilbao en 1924”. Tiu bulteno estas konsultebla en la bitoteko de HEF.

Kaj je la fino, alvenas la princino:

### LA MALGAJA PRINCINO (Rubén Darío)

*Princin' estas malgaja. Kion havas princino?  
Ŝia fraga buŝeto elsopiras sen fino.  
Kaj ŝi perdis koloron, ŝi de longe ne ridas,  
Sur la seĝo el oro la princin' pala sidas.  
Restas muta klavaro, ne aŭdiĝas sonoro,  
Kaj en glas' forgesita svenas ĉarma la floro.*

*La triumfo de pavoĵ jen ornamo ĝardena,  
La mastrina babilo de vantaj' estas plena,  
Ruĝvestita petolas histriono, sed plendas  
Ĉar princino ne ridas, ĉar princino ne sentas;  
Persekutas princin', orienten, ĉielon,  
Sendifinan la penson, iluzian libelon.*





*Ĉu ŝi pensas al princo de Ĉini' aŭ Golkonda  
Aŭ al tiu haltinta por admiri de blonda.  
La princino karesajn, lumodolĉajn okulojn?  
Aŭ al reĝ' forlasinta bonodorajn insulojn?  
Ĉu por estro de klara diamant' ŝiaj ĝemoj  
Aŭ por mastro fiera de Ormuzaj la gemoj.*

*Estus ŝi hirundino, estus ŝi papilio,  
Per rapidaj flugiloj, sur skal' de radio  
Ŝi al suno flugadus, sub lazuran ĉielon  
Suĉus ŝia spirito de la vivo la belon,  
Ŝi liliojn salutis per printempa kantaro.  
Malaperus en vento sur la tondro de l'maro.*

*Ŝi ne amas palacon, ne plu sorĉan balkonon  
Nek arĝentan ŝpinilon, puncan la histrionon  
Nek de cignoj samvoĉaj sur blulago la ĥoron,  
Kaj la floroj malĝojas pro kortega la floro;  
De la nordo nelumbo, la jasmen' de Oriento.  
De la sudo la rozo, dali' de Okcidento,*

*Malfeliĉa princino kun la bluaj okuloj.  
Mallibera en oro, mallibera en tuloj,  
En marmora la kaĝo de vastega palaco,  
En fiera palaco, kie viglas por paco  
Gardistaro, halebardaj cent negroj, kaj sono.  
De ĉashund' nedormanta, kaj kolosa dragono.*

*Ho plej bela princino, estus mi papilio!  
Princin' estas malgaja, pala, kiel vizio;  
Adorata vizio la ebura kaj ora!  
Flugus mi voki princon de land' rozkolora.  
(La princin' estas pala, princin' estas malgaja)  
Ŝi, pli brila kaj ĉarma ol tagiĝo la maja.*

*Ho, silentu, princino, ĉesu jam via palo,  
Diras bona feino. Sur fluganta ĉevalo  
Al vi venas radia, en la zono jen glavo,  
Kavaliro vin koni, li fariĝos la sklavo;  
La venkinto de Morto; kaj denove la flamo  
Viajn lipojn bruligos per la kiso el amo.*

LORENZO NOGUERO

# NUNA WIKIPEDIO



Nuntempe Vikipedio estas unu el la plej ambiciaj iniciatoj de Esperantujo. Mi ĵus trarigardis ties kontrolajn statistikajn paĝojn, kaj nur en la fako pri novaj artikoloj (kiu ne estas la ĉefa) mi konstatis, ke en la lasta semajno oni metis inter 20 kaj 30 novajn artikolojn. Tio estis farita de ĉirkaŭ 30 diversaj esperantistoj el la tuta mondo. Krome alia simila ne tiom granda grupo ne metas novajn artikolojn, sed faras ŝanĝojn kaj plibonigojn en tre diversaj artikoloj. Kaj finfine alia pli grava teamo (ankaŭ pli malgranda ol la unua) dediĉas sin al organizado, administrado kaj ĝenerala kontrolado de la tuto. Tio signifas, ke preskaŭ centoj da samideanoj kunlaboras por la sama entrepreno ĉiutage, dum alia centoj venas de tempo al tempo al Vikipedio kaj faras ion. Kiom da esperantaj organizoj, federacioj, kluboj, eldonejoj ktp., povas fieri pri tiom forta kunlaborado, kaj krome el tiom diversaj mondopartoj?

Tamen ĉio en la vivo havas siajn negativaĵojn. Malkaŝi tiajn aferojn povas helpi al ties solvoj. Ekzemple, kiel bona ekzemplo de Esperantujo, estas ĉefe eŭropanoj kiuj agadas, krom malmultaj usonanoj, brazilanoj, kaj apenaŭ azianoj kaj neniu afrikano, se fidi pri la registroj. Tamen inter eŭropanoj ja estas sufiĉe da diverseco: francoj, hispanoj, germanoj, hungaroj, rusoj, poloj ktp. Tio montriĝas ankaŭ en la enhavo de la artikoloj: pli da eŭropa kulturo ol alikontinentaj. Eble la estonteco ŝanĝos tion.

Alia afero estas ke la tasko estas senfina. Eĉ se la tuta esperantistaro neglektus siajn nunajn taskojn kaj eniros en Vikipedion, neniam en unu vivdaŭro ni atingos la nunan staton de la angla, germana aŭ franca versioj. Kompreneble ni havas nian propran kulturon, kiu eble ne tiom interesas al aliaj lingvanoj. Sed ĉefa celo estas esperantigi la ĝeneralan kulturon, same kiel faras aliaj kulturoj. Se la tasko estas senfina, kial tiom peni? Do, pro la propra tasko. La vojo estas la celo. Dum ni pliampleksigas la enhavaron, ni lernas, diskutas kaj jam havigas materialon por postaj taskoj; ekzemple por personaj studoj, seminarioj, kunlaboraj iniciatoj ktp. Se mi memoras pri mia baza kaj ĉefe meza edukado, mankas al mi lernolibroj en Esperanto. Tio estas, se mi havus esperantlingvajn lernolibrojn pri geografio, naturaj sciencoj, literaturo, matematiko ktp., mi kredus, ke Esperanto ja estas normala kulturo kiu disvolviĝas. Antaŭ tiu manko, Vikipedio povus esti ia surrogato. Fakte jam tre ofte oni citas Vikipedion kiel referenco pri urboj, verkistoj, esperantistoj ktp., kaj iom pri ĉio.

En tiu klopodo por atingi la tutan sciaron ni trafas malavantaĝon kiu aperas ankaŭ en aliaj vivmedioj. Temas pri nomenklaturado en multaj fakoj. Eĉ pri aferoj de la ĉiutaga vivo. Tiele la propra kutima tasko traduki aŭ rekte verki helpas al decidoj, studoj, kolektivaj debatoj pri ĝusta maniero nomigi diversajn aferojn.

Tiukadre foje manko de prepariteco malhelpas la antaŭeniron. Ofte venas novuloj, kies bone intencitaj klopodoj fakte laborigas korektantojn en la plej bonaj okazoj; male, ties fusaĵoj restas ekster eblo esti plibonigita.

Konsiderante la fakon Hispanio kaj hispana kulturo, oni povus diri, ke ili ne estas malbone reprezentata. Estas multaj gravaj artikoloj, sed revenante al tiu menciita senfineco, oni povas konstati, ke ankaŭ multaj fakoj restas nesufiĉe prilaboritaj, ekzemple Eŭskio, la katalunlingva landaro kaj kulturaro, la politika aktualajaro, sportoj, kinarto ktp. Tiele indas menci i ke multaj interesaj fakoj estas malfermaj al necesa kunlaborado. Ĉiu laŭ siaj ebloj povas kontribui. Oni povas meti ĉiutage unu artikolon, unu frazon, unu vorton, ĉio estas bonvena kaj utila.

Nun mi estas laborante dum monatoj (ĉu jam jaroj?) por plibonigo de la mil plej havendaj artikoloj. Tiu estas listo kiu ekzistas simile en alilingvaj vikipediaj versioj. Tiuj artikoloj estas ordigitaj en tri kategorioj laŭ amplekso: malgrandaj, mezgrandaj kaj grandaj. Mi unue plialtigis multajn el malalta al mezalta kategorio. Restis nur malpli ol 150 en la malalta kategorio, plej el ili pri sciencaj fakoj, pri kio mi ne fakas, kaj por kio mi alvokas scienculojn inter la legantoj. Mi ĉiam ripetas, ke ĉio estos bonvena kaj utila. Nun mi dediĉas mian laboron al plialtigo al la plej alta kategorio kaj tie mi krome plibonigas artikolojn per plej diversaj manieroj, korektante lingvon, aldonante bildojn (el aliaj versioj), bibliografio ktp. Parto de tiuj taskoj fakte ne multe kostas. Parto de tiu listo de la mil plej havendaj artikoloj gravas ne nur pro la propra graveco de la artikoloj, sed ankaŭ ĉar ĝi estas uzata por komparoj inter la diversaj versioj kaj ankaŭ tie montriĝas la forto de Esperanto, ankaŭ en ĝeneralaj medioj, ne nur en Vikipedio.

Nun kiam venas decembro kaj multnombraj reaperoj de Esperanto en la ekstera mondo, indas memori al eksteruloj pri la atingoj de la esperantistaro en Vikipedio. Fakte ĵurnalistoj ofte memoras pri tio kaj eĉ foje forgesas la plej oftan demandon pri kiom da homoj parolas Esperanton tutmonde. Ja la ĝenerala vikipediario estas de tempo al tempo celo de novaĵoj en la gazetaro de la ekstera publiko. Ni profitu el tiu aliro alla normaluloj. Ni montru ke nia Vikipedio meritas la penon. Tiele eĉ pasive oni povas helpi. Tio estas, eĉ se vi neniam kontribuis al Vikipedio, vi povas kaj devas kaj rigardi ĝin kaj rigardigi ĝin, tio estas diri al aliuloj ke oni rigardu nin. Tio montros nian forton.

Fakte plej verŝajne ĉiu esperantisto kiu uzas Interreton almenaŭ iam eniris en Vikipedion kaj rigardis ion. Tio jam estas grava atingo.

Eĉ detekti mankojn, se vi ne emas aŭ kredas, ke vi ne kapablas rekte kontribui kaj solvi ilin, povas esti sufiĉa helpo, se vi metas tion mane de iu kiu povas kaj volas plibonigi la nunan staton. Kaj certe estas multaj mankoj, kie ĉiu povas kontribui al tiaj detektoj. Tiele la tuta enciklopedio plu kaj pli pliboniĝos. Tamen senfine...

Kani

## LA BRANĈOJ

*[Margarita de Torres estas kultura aktivulino, kiu, ĉeestinte nian prezentadon de Bohe-  
miaj Lumoj en la madrida teatro Kubik Fabrik, enamigis al nia lingvo kaj komencis  
lerni ĝin. Ŝi verkas, ĉefe rakontojn, en la hispana. Kiel kutime ĉe seriozaj verkistoj, ŝi  
ne tute kontentas pri la plejmulto el siaj elplumaĵoj. Nur unu el ili, Las ramas, kiu, cete-  
re, estis premiita en konkurso, kontentigas ŝin. Miaflanke, traleginte ĝin, mi sentis min  
ravita de ĝia rakonta varpo. Tiom, ke mi tuj esperantigis tiun tekston tiel simplan kiel  
kortuŝan kaj profundan, kun la intenco proponi ĝin por deklamo kadre de la 4a okazigo  
de Vivu la teatro! en Herrera del Duque. Sed fine la kvanto da deklamotaĵoj tiel  
grandis, ke mi devis rezigni mian deziron. Tamen mi ne rezignas prezenti al vi en  
Boletín tiun tradukon faritan de mi mem. Bele, se ĝin vi ŝatos kiel mi, kaj se Margarita  
de Torres baldaŭ verkos rakontojn ankaŭ en Esperanto]*

Kiel ĉiutage, s-ro Jozefo diras, ke li devas iri preni kun si la filon, kaj li foriras el la fabriko antaŭ la elirhoru.

Kun la haroj tiaj, ke ili montras la batalon faritan dum li unuope vojadis hejmen, kaj kun unu arbofolio gluita al la ĵerzo, li troviĝas en la vivoĉambro karesante la tapiŝon el poŝtmarkoj, kiu kovras la surfacon de la tablo.

Je la dua, kun la trankvila balancado de siaj larĝaj koksoj, venas Roza, la mastrumistino, kun la infano.

La etulo, sen delasi sian tekono, eniras kuranta en la vivoĉambron, donas kison al s-ro Jozefo kaj elkrias:

—Ĉu vi scias, paĉjo? La instruisto suferis forflugon de la ĉapo dum la paŭzo. Kaj kiam ni venadis, Roza suferis leviĝon de la jupo. Mi forte ekridis.

La patro prenas poŝtmarkon per pinĉilo kaj diras:

—Tre bone, tre bone. Tio fundamentas.

La infano eltekigas tre damaĝitan kajeron kaj, malfermante ĝin je paĝo plena de forstrekaĵoj, montras ĝin al la patro kaj diras:

—Ni faris kalkulojn. Vidu!



La patro metas lupeon super la poŝmarkon kaj studas ĝin longe. Poste faras eksalton kaj ekkrias:

–Ha, jes! Tre bone.

La infano glutas salivon kaj apartigas la kajeron. Restas kelkan tempon rigardante la poŝmarkojn kun la brovoj kuntiritaj kaj denove malfermas la kajeron. Ĉi-foje li tion faras je nesribita folio:

–Jen ni desegnis katon.

–Tre bone. Tio fundamentas.

La infano mallevas la ŝultrojn kaj entekigas la kajeron. Kaj gluiĝas al la tablo.

Post longa silento, infana fingro timide tuŝetas la randon de poŝmarko:

–Ĝi tre belas.

La patro elpoŝigas naztukon kaj delikate pasigas ĝin sur la poŝmarko. Poste li ekkrias:

–Belas? Poŝmarko ne povas beli. Ĝi estas artaĵo!

–La pasintan jaron mi havis bildojn –diras la infano. Poste li profunde spiras, levas la mentonon kaj aldonas:

–Sed ĉi-jare, ne. Mi ne plu etas.

–Bildojn! Temas pri poŝmarkoj. Mi kolektas ilin por vi.

La okuloj de la infano pleniĝas per sparketoj:

–Por mi?

–Jes.

–Miaj! –ekkrias la infano malfermante la brakojn.

Roza eniras kaj informas, ke la manĝo jam pretas. Ŝi diras al la infano, ke li lavu al si la manojn antaŭ ol sidiĝi ĉetable. La tri homoj eliras el la vivoĉambro. La infano direktas sin al la tualetejo.

Li haltas antaŭ la pordo. La vivoĉambro proksimas. Li eniras rigardi siajn poŝmarkojn. Tra la vitroj, kiuj donas lumon al la ĉambro, la arboj parolas al li per la mil dancoj de siaj branĉoj.

La infano komprenas tian lingvaĵon. Li lante proksimiĝas al la fenestro kaj malfermas ĝin...

La arboj respondas per sonoj de skuitaj branĉoj.

La infano faras duonturnon kaj forlasas la vivoĉambron...

*(Elhispanigo far Miguel Fernández de la rakonto Las ramas, de Margarita de Torres)*



## 76-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

TERUELO, 23-a de junio ĝis 25-a de junio 2017

### ALIĜILO

Plenigu tiun ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la adreso [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es) aŭ per poŝto al la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio (Rodríguez San Pedro, 13, ES-28015 Madrid). Oni ankaŭ povas uzi la formularon troveblan en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso/>

Persona nomo				
Familia(j) nomo(j)				
Adreso				
Urbo kaj provinco				
Retadreso				
Telefonnumero(j)		Membro de HEF?	Jes	Ne
Naskiĝdato (nur por statistiko aŭ rabato)				
Dato de pago (1)		Kategorio		
Kotizo	Donaco	Sumo		

### KOTIZOJ

Bonvolu pagi la kotizon per enbankigo, nepre indikante “Kongreso” kaj *vian nomon* en la bankokonto de “Liberanimo” de la “Caja Rural de Teruel” ES28 3080 0001 8123 5515 9217. Eblas pagi rekte al HEF aŭ al Liberanimo; nepre klare informu la organizantojn en tiu kazo.

KATEGORIOJ	Aliĝo ĝis 31-01-2017 (1)	Inter 01-02-2017 kaj 30-04-2017	Post 01-05-2017 kaj surloka aliĝo
Membro de HEF aŭ Liberanimo	35 €	45 €	55 €
Ne membro de HEF	45 €	55 €	65 €
Juna membro de HEF aŭ Liberanimo (malpli ol 30) (2)	25 €	35 €	45 €
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30 €	40 €	50 €

La aliĝilo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-1996.  
Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago

(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aligitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2016 kaj aprilo 2017

*Noto pri personaj informoj: Via nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en kongreslibro. Vi rajtas sugesti la manieron sub kiu ĝi aperu.*

*Oni planas havigi liston de nomoj kaj retadresoj al ĉiuj kongresanoj, sed vi rajtas peti ke vi ne aperu en tiu listo. Ceteraj informoj estos arkivataj ĉe HEF kaj utiligataj nur por internaj celoj.*